

*Turo de la Fiŝbaseno*

**Office de Tourisme**
Rue de l'Etoile
Tél. 02 43 28 17 22

*officedutourisme@ville-lemans.fr*
*Internet : www.lemanstourisme.com*

LE MANS


# LA ROMIA REMPARO




***G.E.M***
*Groupe Esperanto du Maine*
*Esperanto72gem@gmail.com*
*06 84 53 85 44*

## La Mezepoka kaj Romia remparo

Ĉirkaŭ cento da gallaj urboj estis dotitaj dum la Basa Imperio ( 3a-4a jarcento p.K) de remparo, simbolo de la Imperia renovigita potenco kaj de la profunda, politika kaj administracia reorganizado.



La Mansa remparo estas la plej bone konservita en la tuta Empirio, same kiel tiuj de la du Imperiaj ĉefurboj Romo kaj Konstantinopolo Konstruita je la fino de la tria jarcento (280-290), la remparo protektis la loĝantojn de Le Mans kontraŭ la atakoj de la Bretonoj kaj de la Vikingoj dum la 9a jarcento, do dum ses jarcentoj post ĝia konstruo. Pliaj remparoj estis konstruitaj dum la 13a-14a kaj 15a jarcentoj por plifortigi la protektadon de la urbo.

Tiu fortreso de la Basa Imperio kun perimetro kiu longas 1,3 km, enfermas naŭ-hektaran aeron, kiu fariĝis, dum dek kvin jarcentoj la historia kerno de la urbo.

La remparo estas rimarkinda pro la riĉeco kaj la unika abundeco de la geometriaj ornamoj de siaj eksteraj masonaĵoj, kies dominanta koloro valoris la epiteton « ruĝa urbo »


Sen vera fundamento, la remparo montras bazon el ŝtonoj tavolitaj kaj nude juntitaj

Enkadriga ĉizaĵo kaj skulptitaj bosoj montrantaj arko-desegnoj ornamas kelkfoje tiujn ŝtonblokojn.

Tri vicoj de la bazo kaj komenco de la ekstera ornama masonaĵo




La ekstera ornamaĵo



La ekstera ornama masonaĵo konsistas el zorge rektaj vicoj da malgrandaj ŝtonoj, kiuj tavoloj da brikoj alternas je regulaj distancoj. Tiujn materialojn ligas roza mortero, kies koloron oni akiris per pistita briko aŭ tegolo aldonita al la sablo kaj kalko.

Ornamaĵo sur ŝtono en la bazo




| | | |
|---|---|---|
| 1 - Turo de la Forĝisto | 8 - Turo de la Murpecoj de Gorron | 15 - Turo de la Lernejoj |
| 2 - Turo de la Psalette | 9 - Turo Magdalena | 16 - Turo de Oigny |
| 3 - Turo Margot | 10 - Turo Hueau | 17 - Turo de la Malgranda Sankta Petro |
| 4 - Turo Papegeay | 11 - Turo de la Tunelo | 18 - Turo de la Ekzekutisto |
| 5 - Turo Orbrindelle | 12 - Turo de Tucé | 19 - Turo de la Dika Piliero |
| 6 - Turo de la Kavalerio | 13 - Turo de la Arduloj | 20 - Turo de Bretonio |
| 7 - Turo de la nord-okcidenta angulo | 14 - Turo de la Fiŝbaseno | |

*A – Poterno de la Tunelo*

*B – Granda Poterno*

*C – Malgranda Poterno*

*D – Pordego de Sankta Marteno*

*Vojlinio de la Mezepoka Remparo*


*Probabla aŭ malaperinta vojlinio de la Mezepoka Remparo*

*Vojlinio de la Romia Remparo*

La konstruistoj uzis la malsamajn kolorojn de la ŝtonoj por krei geometrian ornamon kun lozanĝoj, oblikvaj linioj, trianguloj, cirkloj, angulaj krampoj, blankaj rektaj kaj nigraj inversaj lozanĝoj.

← *Stiligita Triangulo*

↓ *Blanka kaj rekta lozanĝo*



↑ *Cirklo*


↑ *Kruco de Sankta Andreo*




Dek unu turoj ankoraŭ estas videblaj, precipe borde de la rivero Sarthe. Iliaj formoj estas diversaj, tamen pli oftas la oblonga duoncirklo. Pli malofte aperas la seslatera kaj hufuma formo

← *Turo de « Tucé »*

Tri poternoj ankoraŭ ekzistas sur la okcidenta flanko de la remparo : la Poterno de la Tunelo, la Granda Poterno kaj la Poterno de la Malgranda Sankta Petro



↑ *Granda Poterno*



*Ronda fenestro en la Turo « du Vivier »* ↑

Pro ĝia bone konservita stato, la Galla-Romia remparo en *Le Mans* estas unika monumento en Francio. Jam de pli ol 1700 jaroj, ĝi atestas pri la bonega kvalito de la Romia konstruado kaj pri la ĉefurba rolo kiel « Civitas » de la urbo *Le Mans.*